estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ la mondo).

Numero 159 — Julio, 1999



Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Geoffrey Greatrex — preskontrolisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:
Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5



Abono por Kanado aŭ Usono estas $8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas $15


☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

# SALUTE KAJ KUN DANKO

1. Salute kaj kun danko
ni turnas nin al Steĉjo nun,
afablas vi sen manko:
ni gastas ĉe la sun'!

2. Ni vidis vin unue
en Sanfrancisko, kie vi
en kurso kontribue
modelis antaŭ ni.

3. Ni sentas vin nestoro
de Sanfrancisko, sed ne nur;
ja viaj dom' kaj koro
gastigas kun plezur'!

4. Pro vi Nova Skotio
plenigas niajn pensojn per
agrabla eŭforio
kaj per revenesper'.


**— Verkis Preben Bagger el Danio laŭ la melodio de konata dana infankanto, kiel dankesprimo por la gastigado ĉe la hejmo de Steĉjo Norvell dum vizito kun la nevinoj je malfrua junio, 1999. Steĉjo jam konis la danojn el pasintjara kursaro ĉe la Sanfranciska Ŝtata Universitato. La loka halifaksa grupeto kunvenis la 23an de junio kun Preben, Eva, Lisa kaj Amalia ĉe la hejmo de Steĉjo, kaj dum agrabla interkonatiĝa vespero Eva kaj Amalia bele kantis al Steĉjo ĉi tiun kanton. Ankaŭ estis bonega metodo por festi la 60an naskiĝtagon de nia grupano David Winters.**

# Renkontiĝo de Ĉeĥaj kaj Slovakaj Esperantistoj en Zilina, Slovakio

En la periodo 21 – 23 aŭgusto, 1998 mi partoprenis renkontiĝon de ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj.

La 19an de aŭgusto mi ekveturis okcidenten de Oradea, Rumanio, trans Hungario, kaj dumvoje mi vizitis ankaŭ Budapeŝton kaj Tatabanyan. La landlimo, kie mi atingis Slovakion, estis ĉe Komarom-Komarno. Posttagmeze la 20an de aŭgusto mi alvenis per trajno al la belega ĉefurbo, Bratislava. Ĉar mi havis kelkajn horojn je dispono, mi vizitis la centron de ĉi tiu historia urbo. Laŭ nia antaŭa interkompreniĝo, tie mi renkontis rumanan samideanon Cristian Mocanu el Deva. Ni daŭrigis la veturadon kune ĝis Zilina.

Tiu urbo situas en la nordokcidenta parto de Slovakio. Frumatene la 21an ni atingis nian celon, Zilina. En la stacidomo atendis min granda surprizo: Aniĉka Nemcova, mia konatulino el la tendaro de Sebranice, Ĉeĥio. Ni estis kondukitaj al la familio Nemec, la organizanto de tiu ĉi renkontiĝo. Ni ĝuis tre agrablan akcepton. Ĉi tie mi ekkonis s-ron Robert Horvath, la pastro de tiu ĉi renkontiĝo. Oni gastigis nin en la Salesiana domo.




Ni partoprenis esperantlingvan sanktan meson kaj tre interesajn prelegojn pri religiaj temoj kaj pri la esperanta movado.

Granda ĝojo estis por mi renkontiĝi kun jam konataj samideanoj, kun kiuj mi pasigis antaŭ unu jaro neforgeseblajn tagojn en IKUE-tendaro en Sebranice: s-ro Miloslav Svacek, prezidanto de la ĉeĥa sekcio de IKUE, inĝ. Kalni, s-ino Hanka Batova, Pavel Petrik, ktp.

La 22an de aŭgusto ni havis la eblecon viziti pilgrimlokon Rajecka Lesna (Sorĉita Arbaro).

Dum la lasta tago, la 23an, ni vizitis la urbon kaj la muzeon de Zilina. La saman tagon ni adiaŭis kaj forveturis. Mi havis la bonŝancon vojaĝi kun germana kaj slovaka geamikoj, kiuj per aŭtomobilo transportis min orienten trans Slovakio ĝis Levoĉa. Dum la vojaĝo ni ekkonis la urbojn Martin, Liptovski Mikulaŝ kaj Poprad.



Vespere ni atingis la historian urbon Levoĉa, kie mi sukcesis viziti la monaĥejon kaj la katedralon. La freskoj de tiu ĉi katedralo estis pentritaj de fama majstro Pavel. Tiu ĉi urbo estas prezentita ankaŭ en la hungara literaturo, en la romano, ***La blanka virino de Löcse*** fare de Mor Jokai kaj la romano ***Nigra urbo*** de Kalman Mikszath.

daŭrigata ⇒

**daŭras ⇒**

La lastan urbon kiun mi vizitis estis Spisska Nova Ves (Igló), sude de Levoĉa. Mi havis la eblecon viziti la faman lernejon de Igló, same fama en hungara literaturo kiel teatraĵo sub la nomo ***La lernantoj de Iglo***. Por mi la urbo estis speciale interesa, ĉar miaj geavoj lernis en tiu ĉi lernejo.

La renkontiĝo kaj la vojaĝo estis por mi neforgeseblaj, kaj mi memoros ilin ĉiam kun granda plezuro.

— Lóránd Monosi, Oradea, Rumanio

Noto de la redaktoro: S-ro Monosi ne menciis en sia artikolo ke IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) estis fondita en 1910 kaj ekde 1951 kunlaboras kun UEA (Universala Esperanto-Asocio). Inter ĝiaj celoj estas evangelizado, eklezia unueco, homa interkompreno, frateco kaj paco, kaj ekumenismo. Tiu ĉi artikolo ankaŭ aperas en la somero 1999-a numero de BAZARO, esperantlingva revuo el Rumanio.

## ESPERANTO KAJ INTERRETO! ...

Izolita en ĉi mondo – ĝi senlimas,
Sen kunuloj por parolo kaj kompren'
Vivas mi en la dezerto de mi mem,
Des pli mi amadas, plendas, ploras, timas ...

Kie sin trovas kunular' el Interreto,
Mi ne aŭdas plu la voĉon eĉ skribita ...
Blokumita inter muroj elgranitaj,
Afliktiĝas mia koro de Poeto ...

Radikalas la ŝanĝado ... Jam ne plu
Samas eĉ la ritm' antikva de l' poemoj ...
Mankas nur ke stumblaj versoj kaj fonemoj
Lame paŝu, dum parad' tra l' avenu'! ...

— Dokito (Manoel Borges dos Santos)
Muritiba - Brazilo

